# *Kuracista laborbrigado en Sudafriko kontra? la Covid-19*




Pretorio, apr 27 (RHK)  Kuracista laborbrigado de Kubo formita de 216 specialistoj jam alvenis al tiu ?i lando la? peto de la koncerna registaro por kontribui al la nacia batalo kontra? la pandemio de Covid-19.

Ili estis akceptitaj de ministra delegitaro en la aerbazo de Waterkloof, kie la ministrino de defendo, Nosiviwe Mapisa-Ngakula, elstarigis la koincidon ke tiu ?i misio alvenas la 27-an de aprilo, tago de la libereco, raportis la informagentejo Prensa Latina.

?i esprimis  por ?iuj, en la spirito de Fidel Castro, dankegon. "Ni scias ke vi ne estas la unua laborbrigado de kuracistoj en tiu ?i lando, kaj anka? ne estos la lasta por helpi la popolojn de Afriko, ?i aldonis.

Nkosazana Dlamini-Zuma, ministrino de regado kooperativa kaj tradiciaj aferoj, memorigis kiel "la kubanoj ?iam estis apud ni, ekde la tempoj kiam ni batalis por nia libereco."

Ni scias ke vi nin helpos nun en la batalo kontra? la Covid-19. Ni dankas vian ?eeston en la spirito de Fidel Castro, de Nelson Mandela, de Oliver Tambo, de Ernesto Che Guevara, emfazis. La

prezidento de Sudafriko, Cyril Ramaphosa bonvenigas vin . Ni tre ?ojas ke vi alvenis, li aldonis.

La ambasadoro de la insulo en Sudafriko, Rodolfo Benítez Verson, esprimis sian fieron pro la laboro de la kubaj kuracistoj, laborbrigado internacia Henry Reeve kreita de Fidel  Castro.

La? klarigis la doktoro Raynaldo Denis de Armas, estro de la kuracista brigado en Sudafriko, post kvarenteno 14-taga, la 216 kuracistoj estos lokataj en la 9 provincoj de la lando, kongrue al la interkonsentita programo la? peto de la sudafrikaj a?toritatuloj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/220988-kuracista-laborbrigado-en-sudafriko-kontrau-la-covid-19

**Radio Habana Cuba**